# REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

*movada revuo en kunlaboro kun REU* *№ 2 (33) aprilo 2006*

***en la numero***

*Juzefoviĉ en "Lev Tolstoj"*

*Apero-1*

*Libroservo de UEA en 2005*

*nova disko kaj novaj "Legendoj" de Mikaelo Bronŝtejn*

*esperantisteco de la skulptisto*

*fragmento el la romano "Sekreto de la patrino"*

*"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia*

***Moskvo 2006***

# enhavo:


01 La aŭtoro de “Kazaroza” en “Lev Tolstoj”
03 Apero-1
04 Lingva Festivalo en Odessa
05 “FI/FU” en Ivanovo
06 Aprilaj ridetoj
06 Internacia Somera Lernejo en Armenio
07 Bonvenon al la suna Jalta!
08 Labora Estrarkunsido en Roterdamo
09 Jam pli ol 1600 aliĝis al la Florenca UK
09 Ankaŭ en 2005 UEA altiris pli da membroj
10 Stefan Maul en la maja Malferma Tago
11 Dojeno de la Delegita Reto festis 100-jariĝon
11 Novaj REU-aliĝoj por 2006
12 Kotizoj de REU por 2006
13 NESTo-2006
13 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio
14 Renkontiĝo en la plej alta lando
14 Esperantologia Konferenco dum la UK
14 Reeĥo en la revuo
15 Kio estas PIP
16 Ne nepre poetoj...
19 Pri kultura heredo de Innokentij Ĵukov
20 Esperanto en la Muzea nokto de Roterdamo
20 Kolker ĉampionis por la kvara fojo
22 Kial lundo ekas sabate?
24 Itala majstroverko en “Oriento-Okcidento”
22 Sekreto de la patrino (fragmento el la romano)
08, 11, 16 anekdotoj
k3 Novaj “Legendoj” startis
k4 Nova disko de Mikaelo Bronŝtejn





*Leonid Juzefoviĉ en “Lev Tolstoj”*
*(fotis V.Seguru)*


## REGo
## (Rusia Esperanto-Gazeto)

**№ 2 (33) aprilo 2006**

*aperadas ekde 2000*

***redaktas*** **Garik Kokolija**
***kunredaktas*** **Viktor Aroloviĉ**
***kunlaboras*** **Maksim Griŝin**

*materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto*

*poŝta adreso:* Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
*retadreso* <gazeto@mail.ru>

***abontarifoj por 2006:***

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 180 rubloj sendendaj al:*
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

*por loĝantoj de aliaj landoj – 18 eŭroj pagendaj al la konto* ***kklg-r*** *ĉe UEA*

# NOVAJ "LEGENDOJ" STARTIS

La 40-jara jubileo de Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM) estis celebrata en la pasinta jaro. Tiu legenda organizaĵo sukcesis dum dek tri jaroj aktive kaj fruktodone funkcii en Soveta Unio, kiam ĉiu desuba iniciato estis neniam aprobata de la supruloj, kiam eĉ la vorto "Esperanto" estis malrekomendata por publikigo ktp.

Kelkajn legendajn facetojn de tiu epoko mi prezentis en 1992 per la libreto "Legendoj pri SEJM", 64-paĝa. La dua eldono de la libreto, aperinta en 1997, estis jam 114-paĝa, ĉar ensorbis kelkajn pliajn legindajn historiojn. Samkiel la unua, ĝi estas plene disvendita.




Pasintjare, trafosante mian arkivon, mi trovis interesajn materialojn pri la unua periodo de SEJM-ekzisto, pli precize – la kolekton de "Juna Esperantisto", samizdata bulteno, aperinta dum 1966-67. Do la plej interesaj artikoloj el tiu kolekto, garnitaj per miaj komentoj, nelongaj sed necesaj, kompletigis la libron, prepartitan por la tria eldono.

Finfine mi povas informi vin, ke la tria eldono de "Legendoj pri SEJM" aperis komence de marto. La 20-an de marto en Moskvo okazis prezentado kaj ekvendo de la libro. 232 paĝoj de la tria eldono, aperinta dank' al subvencio de REU ĉe la eldonejo "Impeto" (ISBN 5-7161-0152-6), enhavas ĉion el la antaŭa dua eldono plus la suplementojn. Kelkdeko da fotoj montras la rolulojn kaj la eventojn antaŭkelkdekjarajn: SEJT-ojn, Konferencojn, junaĝajn heroojn – Povilas Jegorovas, Boris Kolker, Aristids Medinŝ, Vladimir Samodaj, Vitautas Ŝilas, Jefim Zajdman kaj multajn aliajn.

Ĝis la fino de 2006 ĉiu SEJM-veterano, deziranta havi la libron, povas akiri ĝin kontraŭ speciala prezo – 100 rusaj rubloj (plus sendokostoj), sendepende de la nuntempa loĝloko. Ne ekzistas ia speciala listo, krom la aŭtora memoro, kiu entenas supozeble ĉ. 100 personojn aŭ pli. Ne hezitu postuli vian ekzempleron ĉe <mamuto@rambler.ru>.

Libroservoj de landaj asocioj bonvolu informiĝi pri la prezo kaj ricevi rabaton, mendante pli ol 3 ekz. ĉe la sama adreso. Rusiaj esperantistoj (krom SEJM-veteranoj) bonvolu mendi la libron ĉe la Libroservo de REU.

Ĝuan legadon!

***Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)***

# NOVA DISKO DE MIKAELO BRONŜTEJN

Estas registrita kaj produktita nova disko de Mikaelo Bronŝtejn. Jen kion la aŭtoro skribas en la antaŭparolo:

## *Facetoj de l' vivo reala kaj fantazia*

*Karaj! Vi skribis, ke ŝatus ricevi de mi freŝan kantofaskon, ĉu ne? Pardonu min, ke sufiĉe longe daŭris la paŭzo inter via ekdeziro kaj ties efektiviĝo, kaj – jen ricevu!*

*La kantoj, kiujn mi elektis por ĉi disko, estas verkitaj diverstempe dum la lasta jardeko, sed nur unu el inter ili, nome la "Blanka nokto", aperis jam alidiske, kaj eĉ tiu – en alispeca plenumo.*

*Mi decidis paroli al vi diversteme. Ĉi tie vi trovos la amkantojn pri koketulinoj miaj foraj kaj pri la fraŭlineto-Printempo, tentanta min (ĉu ankaŭ vin?) ĝis nun.*

*Vojaĝimpreson pri la brila Parizo. Ion biografian kaj ion protestan. Ion movadeskan. Eĉ iom strangan, unuaaŭde, pli-malpli ŝercan kantoserion, dediĉitan al la 200-jariĝo de Aleksandr Puŝkin…*

*Iudire, en la komenco estis la Vorto. Mi subtenas kaj devas peti, ke vi senplende nur iomete koncentriĝu ĉe la aŭskultado por kapti la aludojn kaj la opiniojn, verŝajne diskutendajn, tamen ja mi rajtas prezenti ankaŭ tiajn.*

*Por iom beligi la aferon mi fojfoje petis asiston de profesiaj muzikistoj. Do nun mi kore dankas la ĉarmajn kunkantantinojn Vera Vlasova, Tatjana Belova kaj Evelina Sokolova, kies voĉoj efektive transformis kelkajn paroladojn al veraj kantoj. Koran dankon ankaŭ al Nadeĵda Pospelova por lerta muzikaranĝo, al Lev Rumjancev por profesia sonreĝisorado, al Nastja Baŝlikova por la arta kovrilpaĝo, kaj, certe, al la producisto Garik Kokolija!*

*Dankon ankaŭ al vi, karaj, kiuj aŭskultas min! Espereble, vi ne bedaŭros pri tio.*

La diskon konsistigis jenaj 16 kantoj: *Printempo bluĵinsa; Koketulinoj; Alternativoj; Adieu, Paris!; Vrako; Gajaj frapistoj; Mi estas kiel vi; Rimarkitaj;* ***Puŝkin-jubileo*** *(Pardonu, Aleksandro!; Parolo de brita delegito; Parolo de pola delegito; Parolo de franca delegito; Parolo de sveda delegito; Parolo de ĉina delegito); Blanka nokto; Por Ĵomart.*

Baldaŭ la disko aperos en la Libroservoj.